Wolf Biermann,

# Soldat', soldat'

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Soldat', soldat'en griza norm',
Soldat', soldat'en uniform',
Soldat', soldat', tro multas vi,
Ne estas ludo tio ĉi!
Soldat', soldat', ne vidas mi,
Soldat', vin en la kompani'.
Soldat' egalas al soldat',
En vivo kaj mortad'.

Soldat', soldat', al kiu fin',
Soldato, tio gvidos nin!
Soldat', soldat', post la detru'
De l' Ter' ne estos venko plu!
Soldato, nia tera rond'
ja estas juna kiel vi!
Fendego estas en la mond',
Ĉe l' rando staras vi!

Soldat', soldat'en griza norm',
Soldat', soldat'en uniform',
Soldat', soldat', tro multas vi,
Ne estas ludo tio ĉi!
Soldat', soldat', ne vidas mi,
Soldat', vin en la kompani'.
Soldat' egalas al soldat',
En vivo kaj mortad'.

*Traduko de la Germana poemo "Soldat, Soldat" de* WOLF BIERMANN *(∗1936-11-15) en Esperanton de* MANFREDO RATISLAVO *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04) en 1982-12.30.*

*Arg-166-329 (2004-02-07 21:09:42)*

*La verkinto, Wolf Biermann, afable donis al mi, Manfred Retzlaff, en 1983-04-11 la skriban permeson de publikigo de mia traduko de la teksto de tiu ĉi kanto.*